

# BULTENO

GERMANA  
ESPERANTA  
FERVOJISTA  
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung  
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 4

Aŭgusto/Septembro/Oktobro 1968

---



Neustadt an der Weinstraße



## Bonvenon en Neustadt an der Weinstraße

### La pordo al la palatinia naturparko

„Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA)“ okazigos sian 12an jarkunvenon de la 11a ĝis la 13a de oktobro 1968 en Neustadt an der Weinstraße. Provizora programo troviĝas sur paĝo 3. Jen kelkaj rimarkigoj pri situo kaj historio de la kongresloko.

Neustadt kaj la vino apartenas unu al alia kiel rebo kaj barelo. Ĉiujare en aŭtuno okaze de le germana vinberrikolto ĉi tie estas elektita kaj kronita la Germana Vinreĝino. Samtempe Neustadt ankaŭ estas arbarurbo, situanta ĉe la pordo de l'Palatinia Arbaro, la plej granda rezervaĵo en natura stato de la Germana Federacia Respubliko.

Antaŭ 700 jaroj la bavara duko Ludwig „Pfalzgraf bei Rhein“ fondis la „Nova Urbo“, la sennoma nova urbo inter arbaroj kaj vinbermontoj. Intertempe la gaja vin- kaj arbarmetropolo kun 32 000 enloĝantoj estas la plej grava el 35 „Neustädten“ en Germanujo, situantaj en la sudokcidenta parto de nia patrujo.

Dum la multkolora aŭtuno, kiam milda suno brilos kaj la somera vestaĵo de la naturo transformiĝos en trankvilecon de la baldaŭa vintro, ni renkontiĝos por nia dekdua jarkunveno, kies tradicia programo estas preparita por vi kun multe da peno. Ni sekvos la inviton de la distrikto Mainz esti gastoj dum unu semajnfino en la ĉarma urbo kun multaj vidindaĵoj en kaj ekstere de la malnova romantika urbparto. La urbdomo troviĝas en iama jezuita ordenkonstruaĵo, konstruita post la jaro 1720. La „Casimirianum“ memorigas, ke Neustadt provizore estis universitata urbo en la 16a jarcento.

Agrablaj vojoj en la proksimeco atendos vin. La urbmontojn „Weinbiet“ — 555 m altan —, „Nollen“ kaj „Bergstein“ vi povos atingi agrable en unu horo. Nur kvaronhoro estas ĝis la „Welsch-Terrasse“ kun panoramo super la urbo.

Neustadt meritas vian viziton. Ne hezitu aliĝi kiel eble plej baldaŭ. Certe vi ne bedaŭros partopreni la jarkunvenon de GEFA.

W. G.

## Ĉi-jare en oktobro al Neustadt/Weinstraße

Post kiam lastjare pro la 19a IFEF-kongreso en Fulda la jarkunveno nur okazis kiel laborkunsido por estraro kaj distriktkomisiito, en aŭtuno 1968 ni kunvenos kiel kutime en iu taŭga kaj bela loko. La distrikto Mainz invitis la 12an jarkunvenon por la 11a ĝis 13a de oktobro al Neustadt/Weinstraße, kiu ne nur estas bela urbo, sed ankaŭ estas favore atingebla de ĉiuj flankoj. Pro tio ni povos kalkuli ne nur pri kontentiga nombro de germanaj kolegoj, sed krome esperas, ke ni povos saluti en la kunveno ankaŭ konsiderindan vicon da eksterlandanoj. Aliĝilon vi trovas kiel aldonajon en ĉi tiu numero de Bulteno. La programo estas sufiĉe alloga kaj ĉiu partoprenonto povas esti certa, ke li travivos agrablajn horojn. Bonvolu do tuj plenigi vian aliĝilon kaj multnombro venu al Neustadt kun ĝiaj arboriĉaj montoj kaj ĝiaj

famkonataj palatiniaj vinoj, kiujn ni esploros en speciala vingustuma ceremonio. Pluraj programoj kiel speciala poŝtofiĉejo kaj poŝtstampo, ekspozicio „Jaro de la homaj rajtoj — vojoj por ilia efektivaĵo“, infanĥoro en folkloraj kostumoj, kiu kantos esperantlingve, ŝlagroj en Esperanto, dancado kaj gaja muziko, ĉio tio valoros la vojaĝon al Neustadt.

Ankaŭ pro alia kaŭzo tiu jarkunveno fariĝos signifoplena por nia germana landa asocio. Kiel sciigite per LIF oni novelektis en Varna la IFEF-estraron. Al ĝi nun apartenas la ĝisnunaj prezidanto kaj sekretario de GEFA. Pro tio la GEFA-estraro devos aliformiĝi. Tio kaj la transdono de la taskoj okazos en Neustadt. Estus ĝojige, se la membraro pruvus sian intereson por tiuj gravaj ŝanĝoj pere de multnombra ĉeesto.

GEFA.

**Aliĝu al nia jarkunveno en Neustadt! Programo sur paĝo 3.**



## 12. Jahresversammlung in Neustadt an der Weinstraße 11. — 13. 10. 1968

**Anmeldeschluß**  
30. September 1968

**Anmeldevordrucke**  
liegen dieser Ausgabe bei. Weitere Exemplare sind bei den Bezirksbeauftragten oder beim Sekretariat der Vereinigung erhältlich.

**Beitrag**  
1,50 DM wird bei der Ankunft erhoben.

**Empfangsschalter und Kongreßgebäude**  
im „Saalbau“ gegenüber dem Bahnhof

**Korrespondenzanschrift**  
EDS-Anschrift: BOS'in Kruse, BSA Frankfurt/Main  
Postanschrift: Frau Elfriede Kruse, 6 Frankfurt/Main 70, Schweizer Str. 104

**Sprachprüfungen**  
Auch in diesem Jahr werden wiederum Sprachprüfungen abgenommen. Anmeldungen umgehend erbeten an: Bb-Oberamtsrat Dr. Lang, Prüfungsamt bei der Bundesbahndirektion Frankfurt/M.; Basa 955/1501.

## Programo de la 12a GEFA-jarkunveno en Neustadt/Weinstraße 11a ĝis 13a de oktobro 1968

**Kongresejo:**  
„Saalbau“, vid-al-vide de la stacidomo  
**11a de oktobro**  
10.00 Gazetara konferenco en hotelo „Kurfürst“, poste ekspocizi-malfermo  
19.00 Kunveno de GEFA-estraro  
**12a de oktobro**  
8.00 Akceptejo malfermata ĝis 18.00 h.  
9.00 Unua rondveturado tra la ĉirkaŭaĵo (proks. 3 horojn)  
12.30 Komuna tagmanĝo en la fervoja kantino

14.00 Dua rondveturado (kiel antaŭtagmeze)  
14.00 Lingva ekzameno, skriba parto (nepublika)  
14.00 Laborkunsido de la GEFA-estraro kaj distriktkomisiitoj (nepublika)  
18.00 Komuna vespermanĝo en „Saalbau“  
19.30 Salutvespero, poste dancado

**13a de oktobro**  
Okazo por viziti deservojn de ambaŭ konfesioj  
9.00 Lingva ekzameno, buŝa parto (publika)  
9.00 Prelego kun diapozitivaj pri la 20a IFEF kongreso en Varna  
10.45 Vingustumado (prezo 5 GM) kaj oficiala fermo  
12.30 Komuna tagmanĝo en „Saalbau“.

Atentu! Kiel kutime niaj eksterlandaj geamikoj estas kore invitataj partopreni nian semajnfinan jarkunvenon, la kulminon de nia asocia laboro. Petu aliĝilon ĉe: Germana Esperanta Fervojista Asocio, sekretario (s-ino Kruse), 6 Frankfurt (Main), Karlstraße 4—6.

### Aktiva GEFA-membro 84 jarojn aĝa.

La 1an de oktobro 1968 nia longjara fidela membro Bul la el Recklinghausen (distrikto Essen) fariĝos 84 jaraĝa. Antaŭ li pensiumiĝis sia deĵorejo estis la fervoja riparejo en Recklinghausen. Nun li loĝas en la sama urbo en la maljunulejo „St. Hedwig“.

Li jam esperantistiĝis en la tridekaj jaroj de tiu jarcento. Ek de tiu tempo li subtenis nian movadon. En la propra distrikto li partoprenas ĉe hodiaŭ preskaŭ ĉiujn kunvenojn, indiferece ĉu ili okazas en Essen, Dortmund aŭ Duisburg. Ankaŭ la IFEF-kongresojn li vizitis re-



gule multajn jarojn, memkompreneble li ne mankis ĉe la GEFA-jarkunvenoj diversloke.

La GEFA-estraro kaj la tuta asocio deziras al nia kara membro ankoraŭ multajn jarojn en plej bona sanstato kaj ni estas certaj, ke li restos fidela al la asocio kaj oni povos saluti lin en la jarkunveno en Neustadt an der Weinstraße.

GEFA-estraro

**Kiel partopreninto de la 20a IFEF-Kongreso**



## Ni legas en

### „Esperanto“ n-ro 7/8 1968

Raporto sub la titolo „En Bulgarujo la dua plej granda kongreso de IFEF“ pri nia 20-a en Varna. Ne menciita estas la elekto de novaj estrarmembroj dum la dua laborkunsido.

Tre legindaj estas la „In-formoj de CED“. En ĝi estas pritraktitaj la „Kosto de plurlingvismo“ kaj la „Perspektoj kontraŭ la Internacia lingvo“.

Kiel helpilo por gazetkonferencoj kaj intervjuoj estas la pritrakto „Kiom da homoj parolas Esperanton?“

Tri internaciaj foiroj ĉi-jare reklamas en Esperanto: Budapeŝt kaj Padova eldonis novajn prospektojn; Barcelona eldonis afiŝojn. Oni petu ilin de la koncernaj foiraj oficejoj.

Cismeze de junio aliĝis al la UEA-kongreso en Madrid 1557 personoj el 37 landoj. GEFA-anoj ankaŭ partoprenis kaj informos vin en la venonta Bulteno.

Okaze de la SAT-Kongreso en Utrecht (3—9 aŭg. 68) la loka poŝtoficejo uzas dum unu monato nederlandlingvan stampon „Esperanto — la lingvo por internaciaj rilatoj“.

### „Heroldo“ organo de Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanta Asocia

En la kadro de la 20a IFEF-kongreso, la 16an de majo 1968, okazis en Zlatni Pjasaci la unua konferenco. Partoprenis 51 personoj el 12 landoj kiuj elektis 15kapan komitaton kun Asen Grigorov el Bulgario kiel prezidanto. La peranto por GFR estas Leo Jolliet, 62 Wiesbaden, Assmannshausenstr. 8a. Laŭ la raporto aliĝis poŝtistoj el ĉ. 30 landoj; je la pinto estas Bulgario kun pli

## Germana Esperanto-Revuo n-ro 7/68 pri la 46a Germana Esperanto-Kongreso dum Pentekosto en Munkeno

Nova trajto en la GEA-kongreso

S-ano advokato Karl Ernst Paesch realigis la unuan podian diskuton kun profesoroj de la universitato Munkeno. Partoprenis prof. d-ro Fritz Wölcken kaj d-ro Ludwig Hammermeyer kaj flanke de la Esperanto-movado prof. d-ro Ivo Lapenna, d-ro Werner Bormann kaj d-ro Italo Chiussi. La urba lerneja referento d-ro Fingerle gvidis la diskuton. Ankaŭ neesperantistoj kaj konata personeco de la Munkena kultura vivo ĉeestis.

Unu el la agrablaj surprizoj estis la ĉeesto de prof. d-ro Ivo Lapenna. Lia festparolado pri „La Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj Lingva Diskriminacio“ estis grava kontribuo al la „Jaro de la Homaj Rajtoj“. Estas bedaŭrinde, ke nur en la lasta momento fariĝis publika la ĉeestado de la UEA-prezidanto. Certe pli da esperantistoj estus venintaj al Munkeno, se ili estus sciintaj tion.

GEFA -anoj partoprenis multnombre. Nome de nia asocio la komisiito Kiefer, Stuttgart, transdonis salutojn kaj menciis, ke Joachim Gießner elektiĝis prezidanto de IFEF dum ties ĵus pasinta kongreso en Varna. Samtempe li informis, ke GEFA estas la plej forta faka esperantista grupo en Germanujo. Ĝi bone kunlaboras kun la sindikatoj.

ol 230 membroj en diversaj urboj. La celoj de nia najbarprofesia asocio estas i. a. disvastigi Esperanton inter PTT-istoj, radio- kaj televido-okupatoj, organizante kursojn, rondojn kaj aliajn formojn de instruado en poŝtejoj, radio- kaj televidostacioj. La propra bulteno

Okaze de la kongreso la trafikoficejo de Munkeno eldonis belan esperantlingvan prospekton. Petu ĝin de Fremdenverkehrsamt, 8 München 2, Rosental 1.

### Aktivaj ĉefoslovakoj

El Ĉeĥoslovakio atingis nin informo, ke „paralele kun la revigliĝo de la socia vivo kaj kun la profundiganta socialisma demokratio en nia respubliko, tuŝantaj ĉiujn sferojn de la homa agado, reviviĝas rimarkinde ankaŭ nia esperantista movado. La junulara sekcio atendas baldaŭan fondon de nova memstara Esperanto-organizaĵo.

### Germanoj kaj francoj

Denove renkontiĝos germanaj kaj francaj gejunuloj ĉi foje de la 30a de aŭgusto ĝis la 2a de septembro — en komforta junulara domo en St. Martin. Okazos ekskursoj, prelego de studdirektoro H. Rössler, diservo en Esperanto, diapozitiva prelego k. a.

### Sennacieca Revuo 1968

la interesan studaĵon de Ulrich Lins „Esperanto dum la Tria Regno“. Li pritraktis tiun tempon el supera vido, atentigante pri interrilatoj, kiujn tiutempaj esperantistoj ankoraŭ ne povis observi nek konstati.

La nova numero estas laŭdinda ankaŭ rilate la eksteran aspekton, aranĝon, sed principe la enhavon.

aperas en 460 ekzempleroj, ekspedataj al 30 landoj. GEFA-membro Heinz Schindler el Schwelm (Wuppertal) partoprenis la kunvenon kaj deklamis kiel gaja kontribuo la versaĵojn „La poŝtelpisto Sabrokrur“. La sekva konferenco okazos 1969 en la kadro de la UK en Helsinko.



# Germana Esperanta Fervojista Asocio (Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk)

Ni invitas niajn membrojn kaj geamikojn al la 12a jarkunveno de GEFA  
en Neustadt/Weinstraße de la 11a ĝis 13a de oktobro 1968

## Provizora Programo

### Vendredon, 11. 10.

Vizitantoj, kiuj alvenos vendredon, bonvolu turni sin al la kunveno en restoracio „Saalbau“ vid-al-vide de la stacidomo.

### Sabaton, 12. 10.

Akceptejo en „Saalbau“ malfermita de 8 ĝis 18 h.

9.00 Omnibusekskurso en la ĉirkaŭaĵo (proks. 3 horojn)  
12.30—13.30 komuna tagmanĝo en la fervoja kantino  
14.00 Laborkunsido de estraro kun distriktkomisiitoj  
14.00 eventuale lingvaj ekzamenoj (skribe)

14.00—17.00 Omnibusekskurso (kiel antaŭtagmeze)  
18.00—19.00 komuna vespermanĝo en Saalbau  
19.30 Salutvespero, poste danco

### Dimanĉon, 13. 10.

9.00—10.30 Prelego kun diapozitivaj pri la 20a Internacia Kongreso en Varna  
9.00—10.30 eventuale lingvaj ekzamenoj (buŝa parto)  
10.45—12.15 Vingustumado kaj oficiala fermo  
12.30—13.30 komuna tagmanĝo en Saalbau

(bonvolu tranĉi ĉi tie)

## Aliĝilo

(bv. skribi per maŝino aŭ preslitere)

Mi aliĝas al la 12a jarkunveno de la Germana Esperanta Fervojista Asocio  
en Neustadt/Weinstraße

s-ro/s-ino/f-ino\*)

familia nomo: ..... antaŭnomo: ..... aĝo: .....

dejorejo: ..... dejora titolo: .....

privata adreso: .....

Mi venos kun samfamiliano (edzino, filo k. a.) ..... laŭ aparta aliĝilo

supozebla alveno (tago/horo): ..... forveturo: .....

Mi deziras loĝi kune kun s-ro/s-ino/f-ino\*) .....

La kotizon de 1,50 GM po persono mi pagos ĉe alveno en Neustadt (eksterlandanoj ne pagas kotizon)

(rezervita por notoj de LKK)

| n-ro | loĝigo | kotizo |  | manĝoj | ekskurso | vingustumado | paperoj |
|------|--------|--------|--|--------|----------|--------------|---------|
|      |        |        |  |        |          |              |         |

\*) bv. streki netrafan



La aliĝilon bonvolu sendi antaŭ la 30a de septembro per deĵorletero al BOSin Kruse, Bundesbahn-Sozialamt Frankfurt (M) aŭ per oficiala poŝto al s.ino E. Kruse, Schweizer Str. 104, D 6 Frankfurt (M) 70.

**Ciuj kunvenoj en „Saalbau“, vid-al-vid de la stacidomo.**

**Ekzamenoj:** Partoprenontoj senprokraste anoncu sin al d-ro Wilhelm Lang, D 6 Frankfurt (M), Fuchshohl 98.

Deĵora adreso: Bb-Oberamtsrat Dr. Lang, Prüfungsamt bei der Bundesbahndirektion Frankfurt (M), telefono 15 01.

Modifoj en programo kaj prezoj rezervitaj

**Germana Esperanta Fervojista Asocio**  
— sekretariejo —

**6 Frankfurt (M) 9, Karlstr. 4—6**

---

Mi mendas liton en ĉambro unulita/dulita en hotelo kategorio I 16—23 GM  
II 12—16 GM  
en gastejo 9—13 GM

por la noktoj:

11/12      12/13      13/14

La prezoj enkluzivas matenmanĝon, servmonon kaj impostojn.

Antaŭvideble mi partoprenos la komunajn manĝojn prezfavorajn

|                       |                  |               |        |
|-----------------------|------------------|---------------|--------|
| en la fervoja kantino | sabaton tagmeze  | proks. 2 GM   | jes/ne |
| en Saalbau            | sabaton vespere  | proks. 4 GM   | jes/ne |
| en Saalbau            | dimanĉon tagmeze | proks. 4—5 GM | jes/ne |

la vingustumandon (rekomendinda)  
dimanĉon antaŭtagmeze 5 GM jes/ne

Mi partoprenos la rondveturadon matene jes/ne posttagmeze jes/ne  
(Prezo estas 2,00 GM).

Mi intencas partopreni ekzamenon jes/ne

Loko ..... dato .....

---

(subskribo)



## Anoncoj

### Kolora florkalendaro kaj bestkalendaro 1969

Kiel en 1968 reaperas en la formatoj 29x30 resp 30x42 cm tiuj belaj foto-kalendaroj. Ĉar la kvanto estas limigita, rekomendu baldaŭ al: Esperanto-Rondo (A. Burkhardt), 7261 Gechingen, Brunnenstraße 4.

### Kristana

#### Esperantista Ligo Internacia

disdonas informan folion en sep lingvoj, inter alie en la germana kaj en Esperanto por varbi interesulojn ĉefe inter la kristanaro. Mendo ĉe: S-ro D. de Boer, Leyweg 303 en Den Haag/Nederlando.

### Die Verhältnisswörter des Esperanto

Der Nachdruck dieses Werkes kann durchgeführt werden, wenn eine Mindestabnahme von 100 Exemplaren garantiert wird. Vorbestellungen zum Subskriptionspreis von DM 3,— nimmt Herr Reinhard Hauptenthal, 6603 Sulzbach, Am Bahndamm 12, ab sofort entgegen.

## Aus den Gruppen

### Wuppertal

Unter der Leitung unseres rührigen Kollegen Hermanns wurde in Hagen eine Gruppe gegründet, die sich an jedem 2. Montag im Monat um 18 Uhr im Unterrichtsraum des Hauptbahnhofs trifft. Am 10. 6. wurden

### Diversaĵoj Aŭstrio

La 9a kaj la 10a — jubilea — Internaciaj Fervojistaj Esperanto-skisemajnoj (IFES) okazos la 15. — 22. 2. resp. 22. 2. — 1. 3. 1969 en la montara regiono de Werfenweng apud Bischofshofen (inter Salzburg kaj Zell am See). La prezo por partopreni po semajno estos proksimume inter 95 ĝis 110 GM kaj inkluzivas: 7 tranoktojn kun 3 manĝoj po tage kaj posttagmeza teo; uzo de banĉambro; komuna aŭtobusa veturado de Bischofshofen ĝis Werfenweng materiallifto kaj reen; valiza transportado kaj la tuta aranĝo mem. La organizo estas en la manoj de nia fidinda amiko Geroldinger, Linz, Marcusgang 7. Informoj kaj aliĝiloj (kontraŭ respondkuponon) ĉe la organizanto.

### Ĉeĥoslovakujo

#### Kroměříž

La distrikta komisiono por turismo eldonis bele ilustritan kaj 12paĝajn faldprospekton pri la ĉarma urbo kaj la vidinda ĉirkaŭaĵo.

### Francoj Avignon

La loka kongresa komitato jam eldonis la provizoran programon de la 21a IFEF-kongreso de la 17a ĝis la 23a de majo 1969. Ĉarma urbo kaj multvalora programo tiros nian atenton dum la kongresa semajno.

### Nekrologo

Simon Csóra forlasis la 21an de junio 1968 nian mondon por ĉiam. Li apartenis al la malnovaj pioniroj de la hungara fervojista Esperanto-movado. Multajn jarojn li redaktis kun fervoro kaj lerteco la organon de sia landa asocio. En 1962, dum la 14a IFEF-kongreso, li famiĝis kiel „sinjoro mikrofono“, ĉiam helpema, gaja, ĝentila amiko. Lia neatendita morto signifas gravan perdon por ĉiuj esperantistaj fervojistoj. GEFA esprimas sian sinceran funebron al la familio kaj landa asocio. GEFA

den interessierten Zuschauern an Hand von Dias die Erlebnisse der Kongreßteilnehmer des 20. IFEF-Kongresses in Varna vorgeführt.

### Italien

Ab 26. 5. 1968 erscheint im amtlichen Kursbuch der Italienischen Staatsbahnen ein Esperanto-Schlüssel

## Germana-Esperanta-Fervojista-Asocio — Centra Biblioteko —

### Librolisto

#### A — Arto, Komerco, Scienco kaj Tekniko

- 1 Konsiloj pri Higieno / R. Stolle (trad. J. Borel) 50 paĝoj
- 2 Sekretoj de la marestaĵoj / P. Gunio 1960 144 p.
- 3 Internationale Eisenbahn-Gütertarife / Sredič (Belgrad) in jugoslawischer Sprache (kun resumo en Esperanto) 1967 164 p.

- 4 Internacia Konvencio pri la Fervoja Paŝaĝer- kaj Pakajtrafiko (CIV) (trad. W. Barnickel) 1967 44 p.

#### D — Dokumentacio

- 1 Sie klagen an! / F. Rispy (en germana lingvo) 112 p.
- 2 Wir Lokomotivführer unter uns (int. Vergleich 1964) 28 p.



## G — Geografio kaj Vojaĝado

- 1 Bulgario 1959 282 p.
- 2 Danio — Kie abundo estas malofta kaj manko pli malofta 32 p.
- 3 Ni en Skandinavio / W. Breinholst 1956 20 p.
- 4 Faktoj pri Norvegujo 1953 64 p.
- 5 Juĝu mem. Faktoj pri Ĉeĥoslovakio 1961 114 p.
- 6 Faktoj pri Germanujo (dua eldono) 80 p.
- 7 Nepalo malfermas la pordon / T. Sekelj 1959 212 p.
- 8 La germanaj orientaj teritorioj — Eŭro-problemo 1960 48 p.
- 9 La Papalagoj / E. Scheurmann (trad. Faulhaber) 80 p.
- 10 La disfloro de nacia vivmaniero en sovetia Uzbekistano (trad. P. Poliŝĉuk) 1967 26 p.

## K — Kantoj

- 1 Ni kantu kaj deklamu (Kantaro de FLE Nederlando) 1949 112 p.
- 2 Junularo kantas (kompilita de GEJ) 144 p.
- 3 Muzilo / Paruzel

## L/D — Literaturo (Dramo kaj Poezio)

- 1 Esperanta Antologio / Red. W. Auld 1958 642 p.
- 2 El Dramoj: Ifigenio en Taŭrido de Goethe, La Rabistoj de Schiller, trad. Zamenhof 48 p.
- 3 Ama stelaro 1922 120 p.
- 4 Miniaturoj / G. Mattos 1959 78 p.
- 5 La floroj de l' malbono / Ch. Baudelaire 1957 398 p.

## L/P — Literaturo (Prozaĵoj)

- 1 Pensoj de Zamenhof 1945 32 p.
- 2 Bofilino / G. Karaslavov 1959 328 p.
- 3 Bulgara Prozo / div. Poetoj 1960 252 p.
- 4 Malsata Stono / R. Tagore 1961 128 p.
- 5 Ĉe la sanktaj akvoj / J. C. Heer — unua parto — 1947 136 p.
- 6 Legolibreto / trad. Borel 44 p.
- 7 La lasta Usonano / trad. L. Wendell 46 p.
- 8 Nord-germanaj Rakontoj / H. Bandlow (trad. Scheerpeltz) 45 p.
- 9 La Instituto Milner / J. Jullien 40 p.
- 10 Bagatelaro / J. H. Rosbach 1951 174 p.
- 11 La fingro de la Diablo / N. Christensen 1957 30 p.

- 12 Sageoj kaj Rakontoj laŭlonge la Rejno / Pagenstecher 1958 48 p.
- 13 El la vivo de Netaŭgulo / Eichendorff (trad. Bennemann) 140 p.
- 14 Anstataŭ edzino / E. Maxwell 1930 212 p.
- 15 Vivo de Nansen / trad. Mota Padrao 1948 24 p.
- 16 La arto fariĝi centjara / L. Wegener 1953 60 p.
- 17 La normandaj rakontoj / Maupassant (trad. Dupuis) 1953 210 p.
- 18 Miru, Pensu, Ridu / P. Bennemann 1950 240 p.
- 19 Kanako el Kananam / Linton 1960 200 p.
- 20 Sipestro rakontas / Lundquist 1962 72 p.
- 21 Rakontoj de Oogai / Mori Oogai 1962 116 p.
- 22 Homoĵ sur la tero / Engholm 1963 236 p.
- 23 Noveloj de Lusin 1963 462 p.
- 24 Kaŭkazaj rakontoj / Lermontov (trad. Staritsky) 1964 70 p.
- 25 Reĝo Lear / Shakespeare (trad. Kalocsay) 1956 156 p.
- 26 Fabela Mondo / Dorelo v. Plato 1950 40 p.
- 27 Novaj Esperanto-Historietoj / div. Aŭtoroj 1956 70 p.
- 28 Kalevala 1964 368 p.
- 29 Janis Rainis 1965 32 p.
- 30 La Bapto de Caro Vladimir / Borovsky (trad. Pumpr) 1953 142 p.
- 31 Trifoje akurate je la dekdua horo / W. Galdert (trad. Ellersiek) 160 p.
- 32 D-ro Dorner / Egerrup 1945 208 p.
- 33 La Kaŝmira Kanto / Raŝidov (trad. P. Poliŝĉuk) 1967 28 p.

## M — Movado — Lingvo kaj Historio

- 1 Leteroj de Lanti 1940 272 p.
  - 2 Leteroj de Zamenhof I 1948 367 p.
  - 3 Leteroj de Zamenhof II 1948 372 p.
  - 4 La Esperanto-Movado / Støp-Bowitz kaj Isbrucker 1948 61 p.
  - 5 Fundamento Krestomatia / Zamenhof 1954 446 p.
  - 6 Historio de la lingvo Esperanto 1887—1900 / Privat 74 p.
  - 7 Historio de la lingvo Esperanto 1900—1927 / Privat 199 p.
  - 8 Historio de SAT 1953 152 p.
  - 9 Esperanto — moderna lingvo / Setälä-Vilborg-Bowitz 1965 136 p.
- daŭrigo en la sekvonta Bulteno

---

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main).  
Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen-Ohligs, Meteorstraße 13. Druck /  
preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug  
ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La  
abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.